

Numero 43

FAMILIA ESPERANTO n-ro 10 (3/2003)



---

# ***FAMILIA ESPERANTO***

**NEREGULA CIRKULAĴO  
DE RONDO FAMILIA**

---



---

**ELDONAS: RONDO FAMILIA DE UEA**

## EDITORIA ANGULO

*Karaj amikoj,*

*Kalkulante la tempon laŭ la naskiĝo de Kristo mi jam prepariĝas fini unu jaron, la 2004-an. Kia ĝi estis? En iuj partoj belega (ekzemple dum mia feriado en Aŭstralio), en iuj pezega (maje-julie), dum miaj restadoj en Slovakio sufiĉe trankvila... Multajn el vi mi renkontis - en Bonn dum la Paska Semajno Internacia, en Gotenburgo dum la UK. Ju pli mi konatiĝas kun nia speciala familio, despli mi emas aliri, demandi preskaŭ ĉiun el vi, ĉar vi estas elstara artisto, vi bonega organizanto, vi havis rarajn spertojn, vi faris interesan laboron, ĉar vi havas grandan familion, vi estas elstara patro, elstara estaĵo en si mem. ..*

*Jen la lasta ĉizara provo prezenti almenaŭ parton de nia bunto. Dankon al ĉiu, kiu helpis en miaj klopodoj.*

*Kaj fine: ne gravas kiel vi kalkulas la jarfinon, havu feliĉan novan jaron!*

*Elkore,*

*Katarina*



**En FAMILIA ESPERANTO n-ro 05 Renato Corsetti skribas, ke la unua numero de la CIRKULAĴO POR ESPERANTLINGVAJ PAROJ KAJ FAMILIOJ aperis en 1987. Sed la veraj komencoj estis multe pli fruaj - atentigas nin sino Margret Brandenburg :**

### **La historio de GEPATRA BULTENO**

Estis František Moravec aŭ Franz Morawetz (kiel oni germanigis), ĉeĥa esperantisto, kiu post la milito restis en Munkeno kaj tie kunlaboris en la unua postmilita germana E-Asocio. Li estis patro de du filoj, Felikso kaj Jozefo, kiuj ek de la naskiĝo aŭdis nur “nian lingvon”. František estis konvinkita kaj konvinkiga por la kazo, ke ni eble havus dubojn ĉe nia, tiam unujara Ulriko. František havis kontaktojn kun la fama familio Minnaja kaj kuraĝon multoblige DIN-A4-folian informilon por interesataj gepatroj. El ĝi fariĝis meze de la kvindekaj jaroj bulteneto en A5, produktata en Flensburg, kien la Moravecanoj intertempe translokiĝis kaj Münster, kie ni loĝis. La kunlaborantoj estis internaciaj, i.a. eksakademiano Albault verve komentis kaj kontribuis.

En Nederlando loĝis familio Koopmans, kie 4 infanoj: Benata, Donata, Feliĉa kaj Esper ricevis la lingvon de siaj konvinkitaj gepatroj. Mia edzo transprenis la tajpadon, enpaĝigon, multoblighadon kaj ekspedadon. El la necesaj “redaktaj konferencoj” fariĝis familia turismo inter Münster kaj Flensburg. Rezulto el unu

tia vojaĝo estis la decido doni al la bulteno pli profesian aspekton kaj oni akceptis la oferton de Rüdiger Eichholz presigi ĝin en lia novekipita presejo en Kanado. Siatempe oni ankoraŭ ne faksis, interreto nekonata, poŝto lama! La eldonritmo de la neniam tro akurata BULTENO GEPATRA absolute fiaskis. Fine aperis la lasta eldono.



*Ĝi estas la titolpaĝo de la Gepatra bulteno januaro-marto 1967 nova kvaronjara serio numero unua.*

*Eldonis kaj redaktis Derrick P. Faux el Anglujo.*

*Surkovrile estas bildo de Edwin, Ria kaj Karlo de Kock.*

*La enhave kaj teknike bonkvalita bulteno kun 27 paĝoj mezuris 10 x 17 cm.*

## **lom da historio - pri la IIK en 1958**

*Pri la UK en Mainz:*

*“Oni antaŭe estis postulinta de la gepatroj, ke ili skribe konfirmu, ke la infano fakte parolas Esperanton. Malgraŭ tio kvar infanoj germanaj fiaskis kaj estis baptitaj de la plimulto nekompateme ‘la krokodiloj’. La infanoj kiuj fakte scipovis la linguon, travivis belegan semajnon.”*

*El: Svisa Espero, 1958, oktobro*

*Elsarkis: Ziko Marcus Sikosek*

## ESPERANTA FAMILIO EN FAMILIA ESPERANTO

### La sekvanta letero kun foto alvenis al ni el Pollando:

Kiam mi aliĝis al Rondo Familia, miaj genepoj Alina kaj Lukasz (nun 17- kaj 24-jaraj) estis infanoj, kiuj ĉiutage dum pluraj horoj estis sub mia gardo. Tiam ni povis multe paroli esperante. Ĉar ili loĝas kun siaj gepatroj aparte kaj estas nun ege okupitaj pri studado, iliaj vizitoj estas raraj. Sed ili scias, ke plej volonte mi parolas kun ili esperante kaj do niaj renkontiĝoj estas por mi duoble ĝojaj. Intertempe ni ĉiuj - eĉ kun iliaj gepatroj, kiuj estas simpatuloj de Esperanto - ofte partoprenis E-aranĝojn.

Lukaso (Lukasz) facile tradukis al niaj brazilaj gastoj diversajn informojn de polaj turismaj ĉiĉeronoj. Mi esperas, ke ni sukcesos ekinteresi pri Esperanto ankaŭ lian fianĉinon. Tiam ilia estonta familio ankaŭ estus E-familio.



*Sidanta maldekstre estas s-ino Sokół, staranta dekstre ŝia filino.  
La foto estis farita en 1998.*

Alina dume komencis lerni la francan. Ŝi tuj konstatis, ke baze de Esperanto ŝi komprenas multajn vortojn.

Krom la genepoj ankaŭ mia filino Ludmila iĝis esperantistino. Ŝi volonte agas en la filio de Pola E-Asocio kaj dum kelkaj jaroj ni kune gvidis E-rondon en la lernejo, kie mi laboris kaj ŝi ĝis nun laboras kiel instruistino de la pola.

Fervora esperantisto estis mia frato. Bedaŭrinde li mortis jam en 1973.

Necesas aldoni, ke ankaŭ mia kuzino estas esperantistino. Ŝi kune kun mia frato partoprenis jam la UK-on en Varsovio (1959).

Al nia Ĉ-trezoro apartenas multaj leteroj el ĉiu kontinento. La genepoj havas albumon kun poŝtmarkoj de diversaj landoj kaj urboj kaj lige kun ĉiu nova korespondamik-(in)o ili serĉis sur la mapoj iliajn loĝlokojn.

Se eblas, mi volonte sendus pere de la cirkulaĵo salutojn al la impona juna brazila Ĉ-familio Melo. La gepatroj kun siaj du filinoj lernis Esperanton kaj fervore aktivis. Ana Clara kaj Larissa korespondis kun miaj nepinoj, sekve ili fariĝis miaj Ĉ-nepinoj. Poste ankaŭ la patro José korespondis kun mi, do, kiam ni renkontiĝis dum la berlina UK, mi nomis lin "mia Ĉ-filo" . Mia tuta familio salutas ilin.

**Aurelia Sokóť**


## KANTOJ VI (Spievanky)

Slovaka popola

Tr.: Joachim Gießner



1. Kan - toj vi, de ki - e i - am
2. Nek el ĉiel' ni fa - lis, nek ar -
3. Kan - tu nun ju - bi - le, kan - tu



vi de - ve - nis? Ĉu el ĉiel' vi  
bar' hejm - lan - do, el a - ni - moj  
vi, bir - de - to, kun ple - zur' ni



fa - lis, ĉu l'ar - bar' vin kre - is?  
ju - naj kres - kis ĉi - u kan - to.  
kan - tos ku - ne sur vo - je - to.

/Sur la kompaktdisko kaj kasedo „Kantoj de l' popolo“, eldonita de KAVA-PECH en 1993/


El: *Kantoj por ĝojo*. Editoris: Stanislava Chrdlová.  
Eldonis: KAVA-PECH, Dobřichovice, 2003.

## ONI PRI NI

### Kvin denaskuloj en La Chaux-de-Fonds

La 16-an de julio kunvenis 5 infanoj, kiuj parolas aŭ paroletas (en la aĝo de 12 monatoj!) Esperanton. Temis pri Romain (nask. 1998) kaj Samuel (2002) Bélisle kaj 2 samaĝaj usonaj gastoj. Plie alvenis familio Lelarge-Kováts kun Martin (2001). Entute estis en La Chaux-de-Fonds 13 geesperantistoj, kiuj akceptis s-inon Hugi el *Journal du Jura* en Biel/Bienne. La ĵurnalistino estis ege impresita kaj multe demandis ĉiun pri Esperanto kaj E-edukado. La rezulto de tiu kunveno estis preskaŭ tutpaĝa artikolo pri Esperanto en la menciita ĵurnalo.

*Laŭ... Svisa Esperanto-Societo informas, 2003, numero 4.*



**En FE 2/2001, paĝo 3, estas foto pri knabeto kun reĝa krono, malantaŭ si kun sia ridetanta patro. Pri ili du aperis en la belga gazeto *Het Volk* (la 8-an de novembro 2003) la suba artikolo:**

### Esperanto kontaktigas Tomas kun aliaj kulturoj

Patro Bart Demeyere el Bruĝo (Brugge, Belgio) edukas la filon per internacia artefarita lingvo.

“Ne estas facile, sed tamen mi daŭre edukas mian fileton Tomas en Esperanto,” diras la bruĝano Bart Demeyere (36).

“Dulingve edukataj infanoj multe pli facile lernas aliajn lingvojn. Krome, per internacia artefarita lingvo kiel Esperanto oni povas kontaktiĝi kun kulturoj en la tuta mondo. Tial mi persistas.”

Restas nekutime. Ekster la domo Tomas parolas la nederlandan kaj en la domo ili faras la saman kun fremduloj; cetere la patro kaj la filo konsekvence konversacias esperante.

Eĉ la libretoj, en kiujn Tomas rigardas, estas en Esperanto.

“Mia edzino mortis ĉe la naskiĝo de Tomas,” diras Bart. “Antaŭe ni jam interkonsentis, ke ni edukados nian fileton parte en la nederlanda, parte en Esperanto. La edzino parolos kun li la nederlandan kaj mi Esperanton. Post ŝia morto mi decidis daŭrigi nian planon. Nur tiu diferenco: Tomas lernas la nederlandan ekster la domo kaj mi konsekvence edukas lin en Esperanto.”

Bart ekparolis Esperanton antaŭ nur dek jaroj. “Antaŭe mi ĉiam havis problemojn pri fremdaj lingvoj. Mi eĉ devis refari unu studjaron pro malsukcesoj pri la franca kaj la angla. Kiel studento mi kontaktiĝis kun Esperanto. Finfine mi povis lerni lingvon sen esceptoj, kies sintakso kaj vortaro estas konstruitaj laŭ unuformaj logikaj reguloj. Tio donis grandan kontentigon al mi kaj tion mi volas transdoni al Tomas”.

Bart konscias, ke konkuri kun la nederlanda estas malfacile, ĉar tiu lingvo ĉieas por Tomaso: ĉe la vartistino, en la lernejo, en la familia rondo kaj surstrate. “Mi tamen persistas, ĉar lernigi Esperanton al Tomaso havas tiom da avantaĝoj. Estas sciite, ke dulingve edukitaj infanoj multe pli facile lernas aliajn lingvojn poste. Kaj tio certe validas por Esperanto, ĉar same kiel al latina, tiu lingvo komprenigas la konstruon de aliaj, konvenciaj lingvoj.”

Bart deziras ankaŭ, ke Tomaso havu kontaktojn kun aliaj kulturoj per Esperanto. “Ĉiujare ni kune partoprenas en kelkaj Esperanto-aranĝoj. Tie Tomaso konatiĝas kun familioj el la tuta mondo, kies infanoj ankaŭ edukiĝas en la artefarita lingvo. La ebleco havigi al Tomaso tiun kulturan pakaĵon, estas unika.”

Ĉu la familio, amikoj kaj najbaroj ne miras pri tiu sinteno de Bart? “Ne,” li diras, “kvankam en la komenco mia familio timis ke Tomaso neniam bone parolus la nederlandan. Sed, kiam ili rimarkis, ke li senprobleme faras la diferencon inter la du lingvoj, ilia skeptikeco ŝanĝiĝis al fiereco.”



**La televidprogramo “Afrit 9” (elirejo 9)** prezentadas neordinarajn homojn aŭ personojn kun neĉiutagaj ŝatokupoj. Ĝiaj redaktoroj kontaktis min pere de la Antverpena E-Centro. Ĉar mi estas membro de Pasporta Servo, ili opiniis, ke plej bone estos filmi kiam mi havos “interesan” gaston. Do, kiam familio Alexander el Usono planis viziti min, mi avertis “Afrit 9”. La 3-an de julio la stabo venis kaj filmis ek de la matena alveno de la trajno ĝis posttagmeze, kiam ni vizitis Bruĝon. Septembre mi ricevis de ĝi kasedon kun la preta filmo por ke mi traduku la esperantajn partojn en la nederlandan. Ĉar la filmado okazis antaŭ nia partopreno en REF, Tomaso tiam apenaŭ parolis Esperanton, sed la filmistoj lerte uzis la tamen eldiritajn E-vortojn.

La filmo montris la kutimajn okazaĵojn je akcepto de gastoj kaj aldonis mian mallongan nederlandlingvan klarigon pri Esperanto.

Mi ricevis multajn reagojn - ĉiun pozitivan. Ili venis ĉefe de esperantistoj, sed ankaŭ de aliaj, eĉ al mi nekonataj personoj. Instigite de la anoncoj pri la elsendo, intervjuis min kelkaj pliaj ĵurnalistoj, kio rezultigis pozitivajn artikolojn en tri diversaj revuoj legataj entute de 1,5 milionoj da homoj. La televida elsendo havis duonmilionon da spektantoj kaj mi estas feliĉa, ke ni havis la eblon tiom grandmezure varbi por Esperanto.

*Bart Demeyere*

## LIBROBRETO

Propono kun aldono:

**En FE n-ro 42 s-ino Margret Brandenburg skribis pri sia granda E-familio. Jen alia interesaĵo el la “Brandenburg-klano”:**

Antaŭ pli ol 20 jaroj mi redaktis en MONATO la infanpaĝon. Dum tiuj 5 redaktaj jaroj ni aperigis en sinsekvaj eldonoj de la revuo la ABC DE LA BESTOJ. La versojn faris membro de nia E-grupo en Münster kaj la desegnaĵojn nia filo Guido. Siatempo naskiĝis la ideo kompili la tuton kiel etan infanlibron, sed ... Tempo pasis, Guido kaj Manfred (la verkisto) edziĝis kaj patriĝis kaj maljuniĝis - aŭ prefere pliaĝiĝis.

Lastjare Guido havis “rondan” naskiĝtagon kaj lia bofratino Barbara elpensis la ideon eldoni la historian - pli ampleksigitan - ABC. Necesis traduko en la germanan, ke ankaŭ komencantoj uzu ĝin. Por atentigi pri la libro en pli vasta ĉirkaŭo Barbara utiligis siajn profesiajn eblojn. Tiu familia verko estas nun mendebla ĉe ŝi aŭ pere de kiu ajn libroservo.



## LA ETA PRINCO MANKAS

La verko de A. Saint-Exupéry *Le Petit Prince* aperis en 55 lingvoj, ankaŭ esperante. *La eta princo* estis eldonita kaj en Francio kaj en Kanado. Estas bedaŭrinde, ke la elĉerpiĝintaj stokoj de ĝi ne denove repleniĝas.

## PACA NOKT', SANKTA NOKT'

Kelkajn tagojn antaŭ la kristnaskfestoj de 1918 en Oberndorf, proksime al Salzburg, (Aŭstrio), venis Joseph MOHR al Franz Xaver GRUBER kun propono komune verki ion por la sankta nokto. Unue Joseph Mohr skribis la tekston kaj transdonis ĝin la 24-an de decembro al sia amiko Gruber kun peto muzikigi ĝin por du solovoĉoj kaj koruso kun gitara akompano.

Tiel la 24-an de decembro 1818 la unuan fojon publike eksonis en la fama historia kapelo de Oberndorf (nun memorkapelo) la mondfamiĝinta kristnaska kanto *Paca nokt', sankta nokt'*.



# ELDONISTO SERĈATA

Originale en Esperanto verkita infanlibro kun lingve modelaj versaĵoj.  
La 74-paĝan, riĉe ilustritan manuskripton verkis  
Leen Deij kaj Lilli Giloteaux.

*Kiu volas ĝin eldoni?*

*Manuskripto havebla ĉe: Esperanto/ LG; 3/6 Allée Béranger  
FR-59170 Croix, Francio*



Du etuloj en kermeso

Du etuloj per la karuselo  
rajdas ronde rond rond rond;  
du etuloj rajdas sur kanelo  
flugrapide rond rond rond.

Du etuloj puŝveturi volas  
per puŝaĝtoj pum! pum! pum!  
Du etuloj knale karambojas  
puŝ-post-puŝo pum! pum! pum!



Du etuloj en bankuvo

Du etuloj kune en bankuvo  
sin sapumas ŝaŭm ŝaŭm ŝaŭm;  
du etuloj sub la duŝa pluvo  
senŝaŭmiĝas ŝaŭm ŝaŭm ŝaŭm.

Du etuloj lude plu ŝprucigas  
tra l' banĉambro ŝruc ŝruc ŝruc;  
du etuloj krie sin instigas  
ŝruc konkuri ŝruc ŝruc ŝruc.



## ESPERANTO HAVIS NAJTINGALON

**Ramona van Dalsem** naskiĝis la 26-an de januaro 1929 en Indonezio. Post la translokiĝo al Nederlando Esperanto donis al ŝi "la mankintan ekvilibron" kaj la kantado ĝojon kaj multajn amikojn. Sian unuan diskon **La feliĉo** ŝi registris en 1967 kaj samjare ŝi aperis ankaŭ persone antaŭ publiko dum la Roterdama UK. Sekvis jaroj da verkado kaj kantado (ŝi skribis tekstojn kaj komponis melodiojn) kaj la dankema publiko honorigis ŝin per la karesnomo "**la esperanta najtingalo**". Multaj, precipe el la iom pli aĝa generacio, parkeras ŝiajn kvazaŭ ŝlagriĝintajn kantojn.



*Kun bona amikino en la amata  
hejmlando - Indonezio*



*La matura kantistino*

Ramona, patrino de du knabinoj, sentema, komprenema, forpasis la 7-an de januaro 1997 en Zoetermeer (Nederlando). Sed ŝiaj kantoj restas. Kolekto de multaj el ili estas la kompaktdisko *Ramona van Dalsem kantas 23 elektitajn kantojn* (eldonita en 2001).



*Ramona kun siaj edzo,  
patrino kaj filino.*

*Ramona van Dalsem*

**La ĉambro kun nomo Ramona van Dalsem** vi trovos en la Esperanto-centro en Antverpeno. (Frankrijklei 140). Temas pri teretaĝa administra ĉambro. La monon por ĝia aĉeto donacis Janneke Dunnewold-Ehrmann ĉe la aĉeto de la domo en 1981.

## Magdaléna Šaturová MEMORE


Kial vi fermas la okulojn  
antaŭ torenta polvo-griz'?  
La vivo daŭre kaŝas florojn  
el fora, hela paradiz' -  
sed nur por tiu, kiu kredas  
spite de ĉio - kaj esperas.

Ne povas atrofii koro  
en kiu amo nestis iam.  
Beno naskiĝos el doloro.  
Paco vizitos koron vian,  
se vi denove provos kredi  
spite de ĉio - kaj esperi.



La bildkarton eldonis Junulara E-societo "Estonto" - Prilep. Sur ĝi estas pentraĵo de Mirjana Ĝorĝioska, lernanto de VII-a klaso - bazlernejo "Rampo Levkata" - Prilep.


## KORESPONDI DEZIRAS

 **Zheng Rong** estas oficistino de medikamenta kompanio. Ŝi naskiĝis en 1962, havas 162 centimetrojn kaj 52 kilogramojn. Antaŭ kvar jaroj ŝi ekседziniĝis, havas 13-jaran filinon. Ŝi ŝatas literaturon, arton, la anglan lingvon, farmakologion, tablotenison, modernan kanton kaj kantadon. Korespondi deziras kun viro precipe (sed ne nepre) el Aŭstralio, Usono, Anglio, Francio por establi internacian E-familion.

Skribu al: Zheng Rong  
Room 205 No. 2 Lane 249  
Huang Pi Road (N) 200003  
Shanghai  
Ĉinio


Rete: <mailto:mailofzc@sohu.com>



 Mia nomo estas **Alexis**. Mi havas 48 jarojn, mia edzino Mariamo 28. Ni havas 7 infanojn. Ni amas ilin kaj amas la naturon. Ni delonge interesiĝis pri homaj rajtoj kaj homaj valoroj. Tial ni volas ekkorespondi kun viroj kaj virinoj, kiuj konscias pri nia mondcivitaneco, kiuj sentas sin solidaraj kun la tuta homaro.

### **Mariamo Bwanga kaj Alexis Aslimani Bengantundu**

Goma Esperanto-Klubo  
B.P. 78 Gisenyi  
Rwanda  
rete: <esperoab@yahoo.fr>



## BONVENON

✿ La dua filino de Egle kaj Manel Lluís Cayuela (Katalunio) feliĉe naskiĝis la 8-an de aŭgusto. Ŝia nomo estas Saule.

✿ La 25-an de septembro naskiĝis la filino de napolano (Italio) Alessandro Sarno: Aŭrora.

✿ Flavia, la dua infano de Guido Carravieri (Italio), naskiĝis la 28-an de septembro.

## NOVAJ PAROJ

♥ Penny Vos (Aŭstralio) kaj Brad Pym (Aŭstralio) renkontiĝis dum konferenco en Sidnejo en marto 2002. Ĉirkaŭ la jarfino Penny translokiĝis kun siaj filinoj Amy, Heidi kaj Freya (ĉiuj esperantistoj) al la hejmurbo de Brad. La geedziĝfesto okazis la 19-an de aprilo 2003.

♥ Bruno Masala (Francio) edziĝis kun Anne la 26-an de aprilo. La preĝeja ceremonio en Metz estis katolika, kun tri pastroj.

♥ Karine Ducloyer (Francio) kaj Eduardo Trápani (Urugvajo) konatiĝis antaŭ tri jaroj dum la trajnvojaĝo al la IJK en Honkongo. Ili geedziĝis la 15-an de februaro antaŭ la urbestro de Montevideo en Urugvajo kaj la 26-an de aprilo en la preĝejo de Iffendic en Bretonio, Francio.

♥ Mayra Núñez Hernández kaj Andrea Montagner geedziĝis la 12-an de julio en la urbodomo de Capiago Intimiano (Komo, Italio).

♥ Olena Payuk (Ukrainio) kaj Andreas Emmerich (Germanio), la prezidanto de Germana E-Asocio, geedziĝis la 19-an de julio en Brombachtal (Germanio). Sian unuan vojaĝon kiel novgeedzoj ili faris al la UK.



*La geedziĝo de Penny Vos kaj Brad Pym*

## EL LA FAMILIAJ ALBUMOJ

Surfote videblas la **familio Matthias:**

Ulrich, lia edzino Nan Matthias-Wang kaj ilia filineto Christina Yali (naskiĝinta 28.07.2002). La kvara persono estas juna seminariano Louis Nbella el Kamerunio.

La foto estis farita dum la Ekumena E-Kongreso en Rimini (30.08.-06.09.2003). Inter la preskaŭ 300 partoprenantoj de ĉi-aranĝo estis pli ol 30 infanoj kaj gejunuloj sub 18 jaroj; por ili estis organizitaj multaj ludoj kaj lingvokursoj.



### IRU NI AL ...

- Kastelo Greziljono. La 10-17-an de aprilo 2004 okazos **Infana renkontiĝo.**

Tel.: + 33 (0)2 41 89 10 34

Reto: grezijono.kastelo@free.fr

ttt-ejo: <http://grezijono.kastelo.free.fr>

**VERSO  
POR  
LOTI**

**Miron, maron, meron  
skribis mi leteron.  
Loâas ricevonto  
transe de la ponto.  
Kiun elektu mi?  
Portisto estu vi!**



**Prezentis Vilma Eichholz**

## KVARGENERACIA ESPERANTO-FAMILIO

**Kiom da esperantistoj estas en la mondo? Kiom da E-familioj? - Mi ne scias. Sed mi kredas, ke plurgeneraciaj E-familioj ege malmultas. Kun via helpo mi eĉ povus ilin kalkuli. Jen unu el ili el Germanio:**

La unua E-generacio:

- Franz Bläsing naskiĝis en 1883, esperantistiĝis en 1908; gvidis E-kursojn.
- lia edzino Dora Luft naskiĝis en 1892.

La dua E-generacio:


- Margarete parolas Esperanton denaske,
- ŝia edzo Willi Klünder estis esperantisto.

La tria E-generacio:

- Helmut Klünder estas esperantisto denaske,
- lia poldevena edzino Ella estis esperantistino jam antaŭ ilia renkontiĝo.

La kvara E-generacio:

- Nils Martin Klünder estas denaska esperantisto. Li naskiĝis en 1992 kaj vivas en Steinfurt, la urbo de sia esperantista praavo.



## RETE HAVEBLAS

**KANTANTAĴ BIRDOJ:** Kantado de 109 eŭropaj birdoj kun iliaj nomoj en Esperanto (mp3 formato) <<http://home.no.net/verdulo/no/birdsounds3.htm>>.

En la nova fako 'Por Infanoj' de la hejmpaĝo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, oni aldonis la tekston de la infanlibro de Elma do Nascimento *LA MAGIA ĈEVALETO*. La retadreso de KKE estas <<http://www.kke.org.br>>. Tuj post la aliro elektu la E-version kaj klaku sur la alternativon 'Por Infanoj'.

## FABELO INTERNACIA

***En la pasinta n-ro vi povis legi alvokon partopreni la ĉijaran E-fabelkonkurson. Jen informoj pri ĝiaj rezultoj kaj pri la venonta:***

La ĉefan premion, "Fabelo Internacia", gajnis Jaroslav Vorobjov el Ruslando, laŭreato de la 1-a premio en la aĝgrupo de 11-13-jaruloj, pro sia fabelo "Ljapiklando kaj ties loĝantoj lĵapikoj".

Premioj:

Kategorio A (6-8-jaraj):

1. Alina Calibe Bruegger (Germanio);
2. Larissa Bister (Finnlando);
3. Francesco Bentigvoli (Italio) kaj Klara Delarasse (Francio).

Kategorio B (11-13-jaraj):

1. Hajnal MacGill (Hungario).

Kategorio C (11-13-jaraj):

1. Jaroslav Vorobjov (Ruslando);
2. Paolo Pezzi (Italio) kaj Silvio Ravaioli (Italio);
3. Laura Ziegelmueller (Svislando).

Grupoj:

1. Grupo el Ecole de la Grande Ourse (Svislando);
2. Grupo "Amiketoj de Kolibridoj" (Kubo);
3. Ivan Gandolfo kaj Martin Haldemann (Svislando).

### FABELKONKURSO ANKAŬ EN 2004

La estraro de la literatura-kultura centro Päätalo-instituto (Taivalkoski, Finnlando) decidis organizi Esperanto-fabelkonkurson ankaŭ en 2004. La konkurso, pri kiu la Instituto kunlaboras kun la Vilgĝa Asocio de Metsäkylä, okazas ekde 2000. Kvankam la Instituto ne tre kontentas pri la nombro de konkursaĵoj (po 14 en 2002 kaj 2003), ĝi fidas, ke venontjare la E-movado diskonigos la konkurson pli aktive.

Anonco pri la sekva konkurso kaj elektitaj premiitaj verkoj el la jaroj 2000-2003 legeblas en:

<http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.ht>

**Osmo Buller**

#### IRANAJ PROVERBOJ

Kie muĝas sento, silentas prudento.  
 Sekreto, kiun konas du homoj, estos konata en ĉiuj domoj.  
 Kiam vi eliras por ĉasi vulpon, estu preta por renkonti lupon.  
 Por ne plu vidi personon, al li pruntedonu monon.  
 De malica najbaro forkuru al arbaro.

*Verkis: Morteza Mirbaqian  
 El: Irana Esperantisto, n-ro 4, 2003.*



## ESPERANTISTINO - PENTRISTINO - GRAFIKISTINO

**Helga Plötner** estas germanino naskiĝinta en 1945, loĝanta en sia naskiĝurbo Gräfenhainichen, esperantistino de 1980.

Ŝi studis pri dentkuracado, pri komercado, dekoraciado de montrofenestroj kaj pri grafiko. En 1963 ŝi eklaboris kiel dentkuracista helpantino, sed dum la sekvaj jaroj ŝi provis multon plian: ŝi estis librotenistino, fakoficistino por salajroj, librovendistino, helpantino en akvodeflua laboratorio, pedagogino. Dum multaj jaroj ŝi gvidis infanajn, junulajn kaj plenkreskulajn pentro-rondojn, provis senlaborecon kaj profesian memstarecon. Propran atelieron-galerion ŝi malfermis en 1999.

Ŝi partoprenis aŭ havis proprajn artajn ekspoziciojn en Germanio (Halle, Lejpsiko, Dresdeno, Berlino - 84-a UK ktp) kaj ankaŭ eksterlande - en Pisanicoa (Bulgario), Vilniuso (Litovio), Varsovio - 72-a UK, Hungario, Baŝkirio ktp.

“Pere de Esperanto kaj dank’ al miaj multaj amikoj kaj konatoj dise en la mondo, mi havis la eblon igi mian vivon pli interesa kaj evoluigi mian artan agadon por hejmo.”



Inter la verkoj de Helga Plötner ne malmultas portretoj de esperantistoj kaj infanoj. Parto de ili estis farita laŭ ĉeestanta modelo, parto laŭ fotoj. Se vi deziras mendi de ŝi portreton, bonvolu uzi la adreson <[helga.ploetner@gmx.de](mailto:helga.ploetner@gmx.de)>. Vi rajtas elekti la uzotan teknikon: desegnaĵo per kraĵono, per ruĝa, nigra, bruna kredo aŭ per koloraj pastelkretoj.

## REAGE, ALDONE

*En la numero 42 vi povis legi pri la movado **TAPORI**.*

*S-ino Elisabeth Barbay aldonas:*

Tre baldaŭ aperos la dua esperantlingva Tapori-libreto, titolita Matuteo, infano el Latina Ameriko. Ambaŭ libretoj apartenas al la sama kolekto **Infanoj de l'kuraĝo**. Ili prezentas la vivon de tre malriĉaj infanoj en diversaj landoj al 7-12-jaraj legantoj.

Grave: je la fino de ĉiu libreto troviĝas demandoj por instigi la leginton reagi kaj skribi al Tapori (en Esperanto, kompreneble). Sugesto: Estas tre facile mendi 10 libretojn (1 libreto kostas 1,07 eŭrojn) kaj diskonigi ilin ĉe siaj membroj por samtempe kaj reciproke helpi ambaŭ movadojn.



*La artikolo pri la arbo ginko instigis s-ron Jean Doublet (Francio) aldoni tre precizajn klarigojn pri la ĉina skribmaniero de la vorto **ginko**.*

Kelkaj el liaj rimarkoj por nelingvistoj:

- La vorto GINKO estas trafa kompromiso inter GINGKO kaj GINKGO. Kvankam la scienca ortografio estas la dua, ĉiuj prononcas laŭ Esperanta skribo. Al tio, ke la parazitaj ne manĝas la foliojn, aldonendas, ke en Hiroŝimao ginkoj postvivis la atombombon. En okcidentaj parkoj oni ŝatas promeni inter viraj ginkoj kiuj portas amentojn, sed ne inter inaj, ĉar ili malbonodoras. Male, en Ĉinio oni ŝatas la inajn, ĉar tie oni manĝas la migdalojn de la fruktoj.

*Ekzistas tri specoj de agoj: moralaj, malmoralaj kaj kaŝitaj.*



*Se vi deziras trafi paradizon en la Ĉielo, ne faru por aliuloj inferon surtere.*

## HUMURO

### Kelkaj Murphy-aĵoj:

*La stoika leĝo de Murphy:* La plejparto de gepatroj meritas siajn infanojn.

*La baza gepatra leĝo:* Hejme neniu estas profeto.

*Leĝo pri ŝatokupoj:* El ĉiuj eblaj hobiaj niaj infanoj elektos la malplej taŭgan.

*La leĝo de rememora optimismo:* La diraĵo, ke tiel en nia tempo ne estis, estas vera. Estis ja eĉ malpli bone.

*[ Ĉu vi scias, kiu estis Murphy? Li naskiĝis en 1917 en Usono kaj estis oficiro kaj inĝeniero de aerarmeo. Lia inventaĵo estas ekipaĵo por mezuri kiom da akcelo eltenas la homa korpo. ]*

### ENHAŬO

2. Editora angulo
- 2.-3. Historio de Gepatra Bulteno  
M. Brandenburg  
Pri IIK en 1958
- 4.-5. E-familio en FE (A. Sokół)
5. Kantoj vi ...
- 6.-7. Oni pri ni
8. Librobreto  
Kiel naskiĝis "Paca nokt' ..."
9. Eldonisto serĉata - Du etuloj
- 10.-11. Esperanto havis najtingalon
11. Memore (M. Ŝaturová)  
E-bildkarto
12. Korespondi deziras  
Bonvenon
13. Novaj paroj
14. El familiaj albumoj (fam. Matthias)  
Iru ni al...  
Lot-versaĵo
15. Kvargeneracia E-familio  
Rete haveblaj
16. Fabelo internacia  
Iranaj proverboj
17. Esperantistino-pentristino...
18. Reage, aldone
19. Humuro

Avino konsilas sian nepinon:

- Bone memoru, ke ĉiu virino devas havi unu grandan amon.
- Kaj kiu estis la via?
- La maristoj.

Malpacience atendas sian amatinon eskimo ekstere, ĉe la enirejo de igluo.

Finfine li eltiras termometron el la poŝo de sia peltaĵo kaj grumbblas:

- Se ŝi ne estos tie-ĉi je 20 gradoj sub nulo, mi foriros.


### FOTOJ KOURILPAĜE:

Supre:

Martin Lelarge,  
la fileto de Katalin Kováts  
kaj Sylvain Lelarge  
(fotis K.Kováts, 2003)

Malsupre:

familio de Kock en 1967:  
Edwin, Ria kaj  
la 4-jara Karlo



## OKAZE DE ĈIŬJ ROVAJ JAROJ

Ĥo, Sinjoro, Vi scias pli bone ol mi, ke tagon post tago mi maljuniĝas kaj unu tagon mi estos kaduka. Protektu min kontraŭ la iluzio, ke ĉiuokaze mi devas diri ion. Savu min de la granda pasio ordigemi la aferojn de aliaj. Instruu min esti pripensema, sed ne ficerbumema, kaj helpema, sed ne direktema. Ĉe mia grandioza kolekto de saĝeco ŝajnas al mi domaĝe ne pludonadi ĝin, sed Vi komprenas, ke mi emas konservi al mi almenaŭ kelkajn amikojn. Protektu min kontraŭ la senfina nombrado de detaloj kaj donu al mi flugilojn atingi la esencon. Instruu min silenti pri miaj malsanoj kaj penoj. Ĵli intensiĝas kaj tiel jarjare la emo priskribi ilin. Mi ne kuraĝas petegi pri la talento aŭskulti kun fardono la historiojn pri la mizeroj de aliaj, sed instruu min pacienc elteni ilin. Instruu al mi ankaŭ la mirindan saĝecon, ke mi povas erari. Konservu min tiom aminda, kiom eblas. Mi ne deziras esti sanktulo - estas tiom malfacile vivi kun tiuj - sed maljuna grumblemulo estas la pinta verko de l' diablo. Instruu min malkovri neatenditajn talentojn en aliaj kaj donu al mi, ho Sinjoro, la talenton ankaŭ mencii ilin.

Teresia de Ĥvilo, la 1-an de januaro 1560

*Laŭ: Laŭte, jan. 03*

**Ĉiu ricevinto de FAMILIA ESPERANTO  
povas libervole kontribui al UEA-konto  
de RF: idoj-P**

REDAKTAS: Katarína Bodnárová, CO de UEA,  
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando  
<cind@co.uea.org>